



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 121 (4/2022) ♦ 31-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org interlingvistiko.net
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Artikoloj 3

Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (2)	3
La Gastolibro de Clarence Bicknell en Esperanto	5
De Esperanto ĝis Dothraki: librorecenzo (1)	7
Pri "Hodler en Mostar" – intervjuo kun Spomenka Štimec	9
CED 70-jariĝas ĉe la 44-a Esperantologia Konferenco	11

Bulteno 14

La lingva milito kontraŭ virinoj	14
Kurso de Esperanto por infanoj en Taiyuan	14
Savu lingvistikon ĉe Huddersfield	14
Esperanto ligas homojn: literatura konkurso	14
La serĉilo, kiu renversis maskoleĝon	15
Magistra interlingvistiko en Poznano	15
Afiŝoj por la Tago de Esperanto	15
Esperantologia Konferenco dum 70-jariĝas CED	16
Akademio-direktoroj elektiĝis	16
Arkivo de UEA nun ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko	17
Madella prelegos ĉe AALA 2022	17
Koutny prelegis ĉe FIPLV-kongreso	17
Sukcese debutis la retaj KER-ekzamenoj	17
AILA-Kongreso 2023	18
Kompromiso inter kompleksaj vortoj kaj kompleksa gramatiko	18
Rapida fonema lernado en la unuaj vivhoroj	18

Genetika lingvoscienco spuras homan migradon	19
Plurlingva gepatreco	19
La lingvaĵo de feliĉo	19
“Women” kaj viroj	19
IKIKO 2022	20
Esperanto, The Aggressor Language	20
Bildstrio pri Zamenhof	20
Mallonga historio de Esperanto	21
Monda Humanitara Tago	21
Esperanto en la revolucia Rusio	21
Konferenco Estonteco de Lingvoj	21
Ĉu esti aŭ ne esti?	22
Universala lingvoreto en la cerbo	22
Edukado.net en Montrealo	22
Latino, lingvoscienco, amikeco kaj poezio	22
Neparolaj voĉsignaloj	23
Lingvoscienco kaj la aŭstronezia ekspansio	23
La lingvo, kiu ne uzas “ne”	23
Lingvaj prognozoj dum komprenado	23
De idealismo al realismo	24
Kantado, parolproduktado kaj la cerbo	24
La estonteco de lingvoscienco	24
Reta KER-ekzameno je nivelo C2 novembre	24
Rudolf Carnap kaj la Esperanto-movado	25

Stipendioj de ESF 26

Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (2)

Bert Boon

<https://esfconnected.org/2022/07/18/numismatiko-2/>



En sia pionira broŝuro *Esperanto-mono* (2000) Hans Jankowski inkludas ne nur Esperantajn monerojn kaj medalojn, sed ankaŭ diversspecajn pagilojn kaj valorpapirojn, uzitajn kiel lokaj aŭ evento-rilataj pagrimedoj. Menciante Esperantan monon, oni nepre atentu emfazi, ke *ne temas pri oficiala valuto*. Nur kelkaj naciaj moneroj, eldonitaj de oficialaj ŝtataj instancoj por honori personojn koncerne Esperantajn aŭ aliajn meritojn, (sur)havas oficialan valuton de la koncerna lando.

Esperanto-valutoj: historiaj kaj transkulturaj provprojektoj

En 1907, nur dudek jarojn post la eldono de la Unua Libro, esperantistaj pioniroj eksentis la bezonon lanĉi internacian valutsistemon en Esperantujo. Tiuj provoj celis plifaciligi komercajn kaj interŝanĝajn rilatojn inter esperantistoj de diversaj landoj kaj konvinki komercistojn tutmondajn pri la avantaĝoj de komuna internacia helpolingvo kaj mondvasta valutsistemo. La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), fondita en 1985, ĝis hodiaŭ reklamas Esperanton pro ĝia praktika uzado en ekonomio kaj komerco.

La unua projekto estis lanĉita de prof. René de Saussure, kiu tamen celis nur imagan internacian monunuon, kiu ebligus oportunan konvertadon de naciaj monunuoj. Kvankam por li moneroj kaj bankbiletoj ne vere necesus, okaze de la 25-jariĝo de Esperanto en 1912 eldonitaj estis la unuaj (t.n. "fantaziaj") pagmedaloj de unu kaj de du spesmiloj. En 1907, kiam ankoraŭ ne ekzistis iuj pagmedaloj, la germana esperantisto Herbert F. Höveler pripensis praktikan aplikadon de la spesmilo-sistemo en la bankservo. En 1908 li fondis en Londono la Ĉekbankon Esperantistan (ĈE). Estis disponigitaj diverstipaj transpagiloj kun spesa valuto.



La banko havis tujan sukceson kaj funkciis kunlabore kun aliaj bankoj kiel *London & South-Western Bank, Ltd* en Merton Abbey (Britio), *Bankhaus Gebrüder Arnold* en Dreseno (Germanio) kaj la banko *A. Saĥarov, Tverskaja* en Moskvo (Rusio). Esperanto-asocioj en diversaj landoj, multaj eldonistoj kaj vendistoj de esperantaj libroj, la *Ĉambro de komerco* en Vaŝingtono (Usono) kaj ankaŭ la famega *Thomas Cook & Son* (Londono) havis kontojn ĉe la esperantista banko.

Resume: en aprilo 1914 jam 730 personoj kaj asocioj en 320 urboj kaj 43 landoj havis kontojn ĉe la ĈE. Ĝi vendis ne malpli ol 20 000 ĉekformularojn kaj 40 000 transpagilojn!

Fulmotondre tiam komencis la terurega buĉado de la t.n. Granda Milito, kiu ne nur nuligis la dekan UK en Parizo sed krome dividis la eŭropajn popolojn kaj ties esperantistojn, sekve sufokis la agadon de la Ĉekbanko. Forpasis Höveler (1918) kaj lia projekto estis likvidita...



En 1946 (!) mondfederalistoj en Hago (Nederlando) laŭ iniciato de i.a. Julia Insbrucker kaj Andre Cseh fondis la Universalan Ligon (UL). Ili volis renaskigi la movadon kaj la mondan Esperantan valuton, laŭ la devizo “unu mondo – unu lingvo – unu mono”. Estis kreita reala pagilo, formo de premio-kuponoj (speco de neoficialaj monbiletoj).



La ligoj ankaŭ tuj planis eldoni metalajn monerojn. En 1960 la Ŝtata Nederlanda Monfarejo en Hago stampis la unuajn stelo-monerojn de 1, 5 kaj 10 steloj. Kun jarindiko 1959!



En 1965 sekvis “monero” en valoro de 25 steloj, respektive en oro, arĝento kaj kupro-nikelo.



Pro la kontinua inflacio en Eŭropo kaj la daŭra malpliigo de la aĉetpovo la membraro de UL eklamis, la ligo ekdormetis kaj la stelo-sistemo silente malaperis. Nuntempe la Internacia Esperanto-Instituto en Hago administras la heredaĵon de la Universala Ligo.

(Daŭrigota en tria artikolo.)

Bert Boon estas belga esperantisto, kiu iniciatis Esperanto-Numismatikan Asocion, la unuan numismatikan UEA-fakgrupon, kaj redaktas ĝian revuon Esperanta Numismatiko. La revuo kaj asocia membriĝo estas senkostaj.

La Gastolibro de Clarence Bicknell en Esperanto

Marcus Bicknell

<https://esfconnected.org/author/marcus-bicknell/>

Ni fieras anonci la tutmondan eldonon de la Gastolibro de Clarence Bicknell en Esperanto, akvarela majstroverko de sindediĉo kaj metiarta talento de distra multesciulo de la malfrua 19-a jarcento. <https://clarencebicknell.com/gastolibro>

Clarence Bicknell (1842–1918, <https://esfconnected.org/2021/05/07/bicknell/>) konstruis sian someran domon, Casa Fontanalba, en la italaj apudmaraj alpoj en 1906, kaj jaron post jaro li kreis mane faritajn velene kovritajn albumojn, kiuj montris la sovaĝajn florojn de la regiono. La *Gastolibro* estis rimedo, kie li povis kombini siajn artajn talentojn kun iom da humuro, samtempe antaŭenigante la universalan lingvon Esperanto.

En la libro, kreita inter la jaro 1906 kaj lia morto en 1918, li skribis ĉe maldekstra paĝo priskribojn en Esperanto de geamikoj, familianoj kaj aliaj, kiuj tranoktis en la domo, kaj ĉe la

dekstra paĝo li pentris akvarelojn de floroj, enkadrigitajn per metiartaj motivoj en parecaj koloroj. La priskribitoj variis de eminentaj botanikistoj kaj arkeologoj ĝis tri hundoj: Leo, Capi kaj la multe amata hundo de Clarence, Mahdi. La paĝo por Emile Cartailhac montras, kiel Clarence estis fiera, ke la konata franca prahistoriisto vizitis la rokajn gravuraĵojn de Val Fontanalba: la inicialoj “E.C.” estas iluminitaj de motivoj el la rokarto inkluzive plugilon kaj bovojn.



Clarence skribis jene pri Casa Fontanalba en 1916: “La muroj estas pentritaj per laburno kaj leontodo kaj troviĝas profunda dekoraĵo kun la komencliteroj de ĉiuj individuoj, kiuj dormis en la domo. Temas pri ĉirkaŭ 110 gis la nuna punkto. Mallonga biografio kun ĉi tiuj komencliteroj estas skribita en Esperanto en libro por la informo de la posteularo.”

Susie Bicknell aprezis la libron en sia artikolo pri la arto de Clarence, kaj Nicolas Bell el la Biblioteko Wren de la Kolegio Trinity (Kembriĝo) same laŭdis la libron post ĝia ekspozicio tie en 2018.

https://clarencebicknell.com/wp-content/uploads/clarence_bicknell_his_art_susie_bicknell.pdf

<https://trinitycollegelibrarycambridge.wordpress.com/2018/06/07/a-botanical-watercolourist-at-trinity-clarence-bicknell/>

La originalo estas en la kolekto de la familio Bicknell. Oni vidas ĝin unuafoje en ĉi tiu plenkolora samgranda reproduktaĵo, eldonita en julio 2022 kaj tutmonde disponebla de Amazon kaj en fakaj librovendejoj. La libro (8×5 kolorojn, 204 paĝojn) inkluzivas tradukojn de la Esperantaj tekstoj en la anglan, francan kaj italan, enkondukon al la libro en ĉiuj kvar lingvoj kaj nomindekson. Eblas aĉeti ĝin ankaŭ de la Asocio Clarence Bicknell (info@clarencebicknell.com), kies membroj ricevas rabaton je 20% (<https://clarencebicknell.com/membership/>).

Casa Fontanalba Visitors' Book, albumo en pli granda formato, en kiu vizitantoj subskribis vidalvide al akvarelo montranta montan floron, haveblas en presita formo jam de 2017.


<https://www.clarencebicknell.com/shop>

De Esperanto ĝis Dothraki: librorecenzo (1)

Stanislav Košecký

<https://esfconnected.org/2022/08/15/piperski-recenzo-1/>

PIPERSKI, Aleksandr: *Конструирование языков: от эсперанто до дотракийского* ‘La konstruado de lingvoj: de Esperanto ĝis Dothraki’. Moskvo, Alypina Non-Fikšn 2017, 224 paĝoj. ISBN 978-5-91671-1.



En la enkonduko de tiu ĉi publikaĵo la aŭtoro klopodas koncize prezenti la kreadon de novaj lingvoj (ilian konstruadon) kiel novan lingvosciencan fakon, kiun li signas kiel **interlingvistikon** (kion ni konsideras ĝia malpli vasta interpreto). En sia teksto la aŭtoro enkondukas konatan sed ĉiam aktualan fakton, ke la kreado de novaj lingvoj, sed ankaŭ okupiĝado pri ili, daŭre renkontiĝadas en la lingvosciencan societon kun priduboj, kaj en la tradicio de lingvoscienco rusa (kaj antaŭe eĉ en la sovetia) oni ĉiam restadas ĉe la priskribo de konscie kreitaj lingvoj kiel “iskustvenniji”, t.e. artefaritaj, kion jam la hodiaŭa (sed ankaŭ la pli malnova) eŭropa lingvistiko/interlingvistiko anstataŭigis per la epiteto *plana* (*planlingvo*).

La neceso de la klasifikado de tiaj ĉi lingvoj elvokas laŭ la aŭtoro la fakto, ke ilia “mondo” estas tre ampleksa. Ĝian aspekton determinas du parametroj:

1. kun kia celo ekestis la lingvo, kaj
2. ĉu ĝi ekestis “de nulo” aŭ surbaze de iaj naturaj lingvoj.

Se ni komencas kun la celoj de la lingva kreado, la plej populara el ili estas perfektigi la homan pensadon pere de nova sistemigita kaj logika lingvo. Kiel akcentas la aŭtoro, tiu ĉi celo estas dense ligita kun la hipotezo de lingva relativeco aŭ kun hipotezo de Sapir–Whorf: *la lingvo influas la pensadon de la homoj, kiuj ĝin parolas*. Se estas tiel, ĉu ne estas necese eltrovi lingvon, kiu estu konstruita severe logiksence kaj en kiu ne troviĝu mankoj? Per ideoj de pliperfektigo de la lingvo, kaj per tio ankaŭ de la pensado, estas gvidataj kreantoj de lingvoj, kiujn ni nomas **filozofiaj** aŭ **logikaj**. Al tiuj ĉi lingvoj envicigas la aŭtoro *Loglan*-on de la jaro 1960.

Kiel oni konstatas plue, la konstruado de lingvoj povas sekvi la praktikan celon – helpadi al reciproka kompreniĝo inter homoj. Estas kompreneble, ke, elirante el la multeco de lingvoj, kiuj en la mondo troviĝas, la rolon de interkompreniĝilo ludas ofte peranta lingvo. Se sur la teritorio de Rusio estas tia la rusa, sur internacia scenejo la homoj kutime interkompreniĝas angle. Ĉe tio ekestas la opinio, ke la elekto de unu lingvo kun aparta statuso ne estas justa. Tiu ĉi realo iniciatis ankoraŭ unu direkton de lingva konstruado, kiun reprezentas la kreado de **internaciaj helpaj lingvoj**. Kaj ankaŭ tie ĉi ni renkontiĝadas kun la evoluo: la eŭropa mezepoka kaj same frua novepoka tempo estis tempo de intereso pri filozofiaj lingvoj.

Kiel interesan informon disponigas la aŭtoro, ke sub influo de la evoluo de informaj teknikoj en la dua duono de la 20-a jarcento la intereso pri tiaj ĉi lingvoj koncentriĝis al universalaj piktogramaj lingvoj. Ĉi-rilate estas menciataj eĉ la t.n. stelaj lingvoj (destinitaj al komunikado kun civitanoj de aliaj mondoj), kio ligiĝas al pliprofundigado de la scienca fantaziado de la nuntempo. Tie ĉi tamen la aŭtoro atentigas pri la risko de ebla kunfluo de ĉi tiaj lingvoj kun la lingvoj de programado [kiujn ni ĝuste nomas artefaritaj – rimarko de la recenzanto] aŭ kun la lingvoj laŭ necesoj de la arta (beletra) kreado.

Ni permesas al ni noteton, ke en la aŭtora klasifiko mankas grava diferencigo – nome divido de tiaj ĉi lingvoj al **projektoj**, **semiplanaj lingvoj** kaj **planlingvoj**, kio en nuntempa interlingvistika literaturo estas jam kutima. Nur malfacile nome eblas kompreni kiel lingvon la proponon, kiu, se diri metafore, ne forlasis la labortablon de sia kreinto kaj simple restis nur *projekto*. Al semiplanaj lingvoj oni envicigas tiajn, kiuj atingis, aŭ eventuale atingas, certan gradon de socia aplikado. Ili estas nur kelkaj: *Latino Sine Flexione*, *Occidental-Interlingue*, *Volapük* kaj precipe *Interlingua*. Fine de tiu ĉi hierarkio staras *planlingvoj*, kies ununura reprezentanto estas *Esperanto* kiel plene funkcia lingvo kun ampleksa bazo de siaj parolantoj kaj ilia agado. Cele de plisimpligo ni ĉi tie lasas ĉe unuopaj projektoj la terminon *lingvo*.

Grava estas la atentigo de la aŭtoro pri plia parametro de la klasifiko de la rezultoj de lingvoplana laboro. La lingvoj, kiuj transprenas sian leksikan kaj gramatikan materialon de la naturaj (etnaj) lingvoj, estas signataj kiel **aposterioraj**; kontraŭ ili tiaj, kiuj estas kreitaj “de nenio”, estas **aprioraj**. Interesa, tamen iomete provoka, estas la noto de la aŭtoro pri eĉ literaturaj lingvoj bazitaj sur kelkaj dialektoj (kiel ekzemplon li prezentas la nuntempan germanan literaturan lingvon). Kiel li akcentas, ili estas nenio alia ol aposterioraj helpaj lingvoj, nur kun tiu diferenco, ke ili estas destinitaj ne por kompreniĝo inter diversaj nacioj, sed nure inter anoj de unu nacio, parolantaj per diversaj dialektoj (p. 18).

La relative ampleksa enkonduko de la libro finiĝas per atentigo, ke la verko ne aspiras al komplekseco kaj disponigas al la leganto plurajn pli detalajn fontojn. Tia ĉi konstato estas plene en harmonio kun la realo, ĉar kelkaj publikaĵoj al la temo prezentas eĉ milon da tiaj ĉi projektoj (ekz. A. D. Duliĉenko 917 el ili ĝis la jaro 1973), atendenda estas ilia stabila kresko, kaj – precipe post ekfunkciigo de Interreto – malkomplikiĝas la problemoj de ilia prezentado.

(*La ses ĉapitrojn de la libro detale esploras sekvontaj partoj de ĉi tiu recenzo.*)

Pri “Hodler en Mostar” – intervjuo kun Spomenka Štimec

Alessandra Madella

<https://esfconnected.org/2022/08/29/pri-hodler-en-mostar/>

Ĉi tiu intervjuo kun kroata verkistino Spomenka Štimec estis farita de Alessandra Madella kaj unue aperis en la retejo de Ĉina Radio Internacia en januaro 2022:

<https://esperanto.cri.cn/recommended2/3842/20220104/726255.html>. *Ŝi afable proponis reaperigi ĝin ĉi tie.*



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj proponis vian libron *Hodler en Mostar* (2006) por la Tago de la Esperanta Libro (la 15-a de decembro) 2021. Kion vi povas diri al ni pri ĝi?

Oni diras, ke Esperanto ne havas kulturon. Malĝuste! Nia kulturo estas impona. Nia tegmenta asocio UEA naskiĝis en 1908 en tre kultura loko. La ideo pri ĝi ĝermis en la hejmo kaj ateliero de tre fama svisa pentristo Ferdinand Hodler. Lia filo Hector estis la kunfondinto de nia tegmenta asocio. Kiam mi aŭdas, ke ni estas senkulturuloj, mi respondas: Mi ne dirus tion. Ni eĉ heredis la pentriston Ferdinand Hodler pere de Hector. Testamente Hector lasis sian heredaĵon duone al sia edzino Emilie, kun kiu li edziĝis en 1917, unu jaron antaŭ la morto, kaj al sia ido Universala Esperanto-Asocio. Malrekte, per Hector, ni ricevis la monon kiu apartenis al Ferdinand.

Kiel vi havis la ideon verki la romanon?

Mi ĉiam volis spekti la pentraĵojn de Hodler en Svislando. Kaj iutage mi legis en ĵurnalo, ke Hodler gastas en Zagrebo! Mi iris al la ekspoziciejo kaj komprenis, ke tio ne estas Ferdinand Hodler el Svislando sed el Sarajevo! Mi komprenis, ke miaj najbaroj en Bosnio havas mirindan rakonton pri la patro de Hector Hodler en sia galerio. Kaj mi opinias, ke esperantistaro meritas koni tion plian, kion ni havas.

Kiel vi esploradis por la romano?

Mi staris en tiu zagreba ekspoziciejo kaj gaxis al la pentraĵo nomata *Tajlorino* aŭ *Aŭgustine* kaj komprenis, ke mi vidas la unuan “portreton” de Hector Hodler, ĉar tiu tajlorino estis graveda. Mi kontrolis en kiu jaro ĝi estis desegnita: en 1887, kiam naskiĝis Hector. Mi komprenis, ke mi devas aĉeti ĉiujn eldonaĵojn pri Hodler el Sarajevo kaj Ljubljana (kie la ekspozicio iam gastis), por kolekti informojn. Krome, kiam mankis informoj, mi enŝaltis mian fantazion.



Kiun lokon havas tiu libro en via verkaro?

Gravan. Dankon ke vi metis ĝin kiel legaĵon por la Zamenhof-tago 2021!

Kial vi decidis verki tiun ĉi libron kaj la plejmulton de viaj libroj rekte en Esperanto?

La kroata lingvo havas multajn verkistojn. La esperanta ne tiom. Mi helpu al tiu, kiu estas malpli forta. Kaj kiun mi multe amas. Mi ŝatas ankaŭ la kroatan, kompreneble. Mi verkis ankaŭ en ĝi.

Ĉu vi verkis aliajn librojn, kiuj iel priparolas la historian fonon de Esperanto?

Jes. *Ombro sur interna pejzaĝo* estas romano pri esperantaj amoj kaj disiĝoj.

Kiuj el viaj libroj estis tradukitaj al aliaj lingvoj ĝis nun? Ĉu estas ĉinaj tradukoj?

Kroata milita noktolibro havas ok eldonojn en tiom da lingvoj. *Ombro sur interna pejzaĝo* estas italogita el la esperanta eldono. *Tilla* aperis en la japana kaj korea.

Ĉinigitaj kaj publikigitaj ĉe la Universitato de Harbin estas miaj vojaĝimpresoj el Japanio, *Nesenditaj leteroj el Japanio*. Oni informis min, ke tiu verketo estis helpliteraturo por ĉinaj studentoj, kiuj studis la japanan.

Ĉina esperantistino Harpina en 2021 publikigis en Interna Mongolio mian instruilon laŭ la Zagreba metodo “Esperanto ne estas nur lingvo”.



Krome mi inspiriĝis pri la japana ĵurnalistino Hasegawa Teru, kiu edziniĝis al ĉina esperantisto, fuĝis kaŝe el Japanio al Ĉinio, alvenis... (komprenis ke li jam havas edzinon tie), komprenis ke la japana armeo invadas Ĉinion, ricevis ordonon reveni hejmen kun aliaj japaninoj... sed ŝi decidis resti kaj lukti kontraŭ la japana armeo. Mi verkis teatraĵon por la pekina UK (1986): *Virino kiu flustris en uragano*. Tre interese estis, ke la afiŝo de tiu teatraĵo ricevis la premion “Cent plej belaj afiŝoj de la mondo” kaj estis ekspoziciita en Parizo ĉe Unesko en 1987.

Via verko estas ankaŭ prezentita ekster Esperantujo en la germanlingva libro *Die Bienen und das Unsichtbare (La abeloj kaj la nevidebla, 2020)* de la aŭstra verkisto Clemens Johann Setz...

Clemens Johann Setz estas tre estiminda nuntempa aŭstra verkisto. Kvankam li ne estas esperantisto, li decidis dediĉi sian romanon al la fenomeno de planlingvoj. Li lernis Volapukon por kompreni, kio ĝi estas. Li lernis Esperanton. Li komprenis, ke tiu Esperanto havas indan literaturon kaj sur cento da paĝoj li priskribis kio estas la esperanta literaturo por la nesciaj germanaj legantoj. Tiu lia libro ricevis la plej prestiĝan germanan premion *Georg-Büchner-Preis* en julio 2021. Li verkis pri Vasilij Eroŝenko: la rakonto pri li gvidas tra tuta historio de la Esperanta literaturo sur cento da paĝoj. Kaj ene de ĝi sur deko da paĝoj li analizas mian kontribuon al la Esperanta literaturo, kun admiro, kiel li subskribis. La libro devus baldaŭ aperi ĉe Mondial en Esperanto.

CED 70-jariĝas ĉe la 44-a Esperantologia Konferenco

Guilherme Fians

<https://esfconnected.org/2022/09/12/ced-70-jarighas/>


<https://interlingvistiko.net/interlingvistiko/esperantologia-konferenco-2022/>

En pluva tago en Londono en 1952, leginte ankoraŭ unu ĵurnalsman artikolon, kiu misprezentis Esperanton kiel “la malsukcesintan universalan lingvon ne plu parolatan”, Ivo Lapenna stariĝis de sia oficeja seĝo, rigardis tra la fenestro kaj pensis: “Venis la tempo por krei ian fondaĵon aŭ esplorcentron por pruvi la valoron de Esperanto per serioza akademia esplorado.” Dum la pluvo plifortiĝis kaj la fulmo batis el la ĉielo de la brita ĉefurbo, Lapenna eldiris la vortojn: “Tiu esplorcentro nomiĝu CED!”

Ne, la dramigita sceno ĉi-supre ne baziĝas sur vera historio. La kreo de CED – la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj – ne okazis kvazaŭ revelacie. Sed CED ja estis fondita en 1952 kaj kalkulis Lapenna kiel unu el siaj fondintoj kaj ĉefaj figuroj.

70 jarojn poste CED daŭre financas esplorprojektojn, subtenas esploristojn, eldonas revuojn kaj okazigas regulajn konferencojn pri planlingvoj kaj lingvoplanado. Por festi sian 70-jariĝon, CED okazigis la 44-an Esperantologian Konferencon (EK) ene de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, la 11-an de aŭgusto 2022 en Montrealo (Kanado).

La ĉi-jara EK estis organizita de Guilherme Fians kaj Mark Fettes kaj enhavis (1) specialan sesion por festi la CED-datrevenon; (2) du sesiojn da prelegoj kaj prezentoj de referaĵoj; kaj (3) publikan rondatablan debaton pri la akcepto (aŭ malakcepto) de Esperanto kiel esplortemo en universitatoj. Estante unu el la malmultaj hibridaj eventoj en la ĉi-jara Universala Kongreso, la EK allogis partoprenantojn kaj fizike kaj virtuale, nombrante pli ol 40 samtempajn ĉeestantojn.



La unua sesio enhavis prelegojn de Mark Fettes, Sabine Fiedler, Grant Goodall kaj Jonathan Pool. De rakonto pri la historio de CED ĝis diskuto pri la ĉeesto de Esperanto en akademiaj debatoj, tiuj prelegoj substrekis, ke Esperantologio kapablas disrompi teoriajn antaŭsupozojn pri lingvolernado, parolkomunumoj kaj lingvaj ideologioj. Tiu kontribuo iĝis aparte pika en la prelego de Goodall, en kiu li emfazis lastatempan deklaron de Noam Chomsky pri Esperanto: anstataŭ forrifuzi Esperanton en sia ofte citata frazo “Esperanto ne estas lingvo”, Chomsky volis diri, ke Esperanto ne konformas al la praktika difino de lingvo laŭ formala lingvistiko.

La du postaj sesioj enhavis diverstemajn prelegojn pri Esperantologio kaj interlingvistiko de Gabriel Labrie, Guilherme Fians, Davide Astori, Christer Kiselman, Bernhard Tuidier kaj Pascal Dubourg-Glatigny. Aparte atentigaj, tiel al esploristoj kiel al la ĝenerala publiko, estis la rimarkoj de Tuidier kaj Dubourg-Glatigny pri la privataj arĥivoj kaj dokumentoj de homoj. Kvankam plej multaj el ni simple forĵetas ĉiajn dokumentojn, leterojn kaj notojn rilatajn al nia dumviva procezo de lernado kaj uzado de Esperanto, tiuj materialoj eble konsistigos valoregan unuarangan fonton por estontaj historiistoj. Fosante tra ies engagiĝo kun Esperanto, historiisto povas praktike vidi, kiel la lingvo fariĝas signifoplena kaj funkcia laŭ ies persona perspektivo. Alivorte, eĉ se plej multaj el ni estas ordinaraj Esperanto-parolantoj, niaj opinioj pri Esperanto gravas al esploristoj kaj eble malkaŝos preterviditajn aspektojn de la

nuntempaj Esperantaj komunumo kaj movado. Tiel, tiuj du prelegoj unu post la alia petis rekonsideri tion, kion ĉiu el ni povas donaci al historio kaj la sociaj sciencoj kiel Esperantaj parolantoj kaj/aŭ aktivuloj.

Fine, interesa aspekto de la ĉi-jara EK estas, ke ĝi kunvenigis frukarierajn esperantologojn – kiel Gabriel Labrie – kaj ĉefrolantojn en la fako – kiel Christer Kiselman, kiu dum jaroj organizis la EK kaj redaktis la revuon *Esperantologio / Esperanto Studies*. La generacia dialogo estigata de ĉi tiu akademia spaco en Esperantujo donas senton pri kontinueco, kiu sin etendas ĝis la fruaj tagoj de CED: male de la malluma tago spertita de Ivo Lapenna en la fikcia rakonto, kiu malfermis ĉi tiun artikolon, la sunaj (kaj neatendite varmaj) tagoj de Montrealo dum la somero de 2022 ŝajnas signi helajn tagojn venontajn al CED.

La 44-a EK dependis de financa subteno de ESF, kiu financis la vojaĝon de Guilherme Fians (Universitato de St Andrews, Skotlando) al Montrealo por ĉeesti la 107-an Universalan Kongreson de Esperanto, por kunorganizi la EK kaj por prezenti sian plej lastatempan libron (Esperanto Revolutionaries and Geeks: Language Politics, Digital Media and the Making of an International Community, “Esperantaj revoluciuloj kaj gikoj: lingvopolitiko, ciferecaj komunikiloj kaj la kreado de internacia komunumo”, 2021) dum la publika kunveno de ESF.

La lingva milito kontraŭ virinoj

<https://esfconnected.org/2022/07/01/linguistic-war-womankind/>

<https://www.spiked-online.com/2022/06/11/the-linguistic-war-on-womankind/>

Ĉi tiu artikolo en la angla diskutas la sekvojn por la reala mondo de tio, kion ĝi nomas la “lingva tordiĝado” pliige uzata en la nuntempa angla lingvo por eviti la vorton “virino” kaj rilatajn akuzojn pri transfobio.

Kurso de Esperanto por infanoj en Taiyuan

<https://esfconnected.org/2022/07/05/course-children-taiyuan/>

<https://sezonoj.ru/2022/06/azio-7/#more-19400>

La 18-an de junio instruistoj ĉe elementa lernejo en la urbo Taiyuan en la provinco Shanxi (Ĉinio) okazigis Esperanto-kurson en la infana centro de loka loĝkvartalo. Infanoj lernis kiel diri “feliĉan patrotagon”, kaj la kurso multe plaĉis al ili.

Savu lingvistikon ĉe Huddersfield

<https://esfconnected.org/2022/07/06/save-linguistics-huddersfield/>

<https://www.change.org/p/save-linguistics-at-the-university-of-huddersfield>

En junio la Universitato de Huddersfield (Britio) anoncis 37 maldungojn en la Fakultato pri Artoj kaj Homaj Sciencoj, kaj ekzistas risko, ke ne plu restos lingvistika fako. Lingvistiko ĉe Huddersfield estas tutmonde konata pro sia laboro pri stilistiko, korpusa lingvistiko, pragmatiko kaj konversaci-analizo inter multaj aliaj kampoj, kiel ankaŭ pro sia elrigarda laboro per la internacie renoma populara lingva revuo *Babel*. Vi povas helpi per subteno al la petskribo.

Esperanto ligas homojn: literatura konkurso

<https://esfconnected.org/2022/07/07/esperanto-connecting-people/>

<https://espero.bialystok.pl/eo/12-a-eldono-de-la-literatura-konkurso-esperanto-ligas-homojn/>

Oni invitas vin partopreni en la 12-a literatura konkurso “Esperanto ligas homojn” per rakonto sub la titolo “Kio estas feliĉo por mi?”

La konkurso, organizata en Bjalistoko, celas plenkreskulojn kaj junulojn pli ol 15-jaraĝajn. Ĝiaj celoj estas: diskonigi la ideojn de Esperanto kaj la lingvon kreitan de bjalistokano L. L. Zamenhof; inspiri por legi beletron; provi taksu la ĉirkaŭantan mondon; kaj krei la ŝancon por malkovro kaj pliprofundigo de literatura talento.

La serĉilo, kiu renversis maskoleĝon

<https://esfconnected.org/2022/07/08/search-engine-mask-mandate/>

<https://www.theverge.com/2022/6/7/23153218/legal-corpus-linguistics-mask-mandate-judges>

Populariĝis la uzo de tekstaj korpusoj por solvi jurajn demandojn, sed lingvistoj zorgas, ke juĝistoj ne estas sufiĉe bone trejnitaj por uzi tiujn ilojn ĝuste. Ĉi tiu anglalingva artikolo priskribas, kiel juĝisto en Florido uzis tekstaron por decidi, ke vizaĝmaskoj ne kalkuliĝu kiel “sanitation” (higienigon).

Magistra interlingvistiko en Poznano

<https://esfconnected.org/2022/07/11/masters-interlinguistics/>

<https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/>

http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/magistraj_apr22.html

<https://rekrutacja.amu.edu.pl/en/studies-cataloge/jezykoznanstwo-i-zarzadzanie-informacja-specjalnosc-interlingwistyka,554>

Ĝis la fino de julio eblis aliĝi al la magistras studoj pri interlingvistiko, kombinite kun informmastrumado, ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Ĉi tie Esperanto kune kun la angla servas la instruadon de gestudentoj el la tuta mondo: interlingvistikaj studobjektoj en Esperanto kaj informmastrumado en la angla.

Afiŝoj por la Tago de Esperanto

<https://esfconnected.org/2022/07/12/esperanto-day-posters/>

<https://espereto.com/informiloj>

Kiel kutime, okaze de la Tago de Esperanto, kiun oni tradicie festas la 26-an de julio, talenta grafikisto kreis kaj enretigis du disvastigindajn afiŝojn, kiuj nun estas tradukataj/adaptataj al aliaj lingvoj.

La jam pretaj afiŝoj estas elŝuteblaj.

Esperantologia Konferenco dum 70-jariĝas CED

<https://esfconnected.org/2022/07/13/esperantology-conference-ced-70/>

<https://uea.org/asocio/ced>

La 44-a Esperantologia Konferenco, okazinta en 2022 en la Universitato de Kebekio en Montrealo kadre de la 107-a Universala Kongreso, elstarigis la 70-jariĝon de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) per la temo “CED 70-Jara: Bilanco pri la Kontribuoj de Esperantologio al Sociaj, Politikaj kaj Lingvistikaj Fakdebatoj”.

Ĝi okazis jaŭdon, la 11-an de aŭgusto, la tutan tagon, de 9h00 ĝis 18h00 EDT (UTC-4). Ĉeforganizis ĝin d-roj Guilherme Fians (Universitato Saint Andrews, Skotlando) kaj Mark Fettes (Universitato Simon Fraser, Kanado). La organizantoj bonvenigis al ĉiuj ĉeesti la prelegojn kaj partopreni la publikan debaton. Aldone al la konferenco okazis ankaŭ publika kunsido de CED, vendredon, la 12-an de aŭgusto.

La konferenco okazis en tri partoj: (1) festsesio honore al la 70-jariĝo de CED; (2) du sesioj pri prelegoj kaj referaĵoj; (3) publika debato/ronda tablo, malfermita al ĉiuj, pri la akcepto (aŭ malakcepto) de Esperanto kiel studobjekto de la sciencoj.

Akademio-direktoroj elektiĝis

<https://esfconnected.org/2022/07/14/academy-directors-elected/>

https://www.akademio-de-esperanto.org/akademio/index.php?title=Sekcioj_kaj_Komisionoj

La 29-an de junio, ĉiuj 45 akademianoj estis voĉdonintaj por elekti la estraranojn kaj direktorojn de la Akademio de Esperanto en la postenperiodo 2022–2025.

Kiel estraranoj estis elektitaj: Probal Dasgupta (prezidanto), Brian Moon kaj Bertilo Wennergren (vicprezidantoj) kaj François Lo Jacomo (sekretario).

Nova sekcio “Interkonsilejo” estis kreita por rapide pridiskuti lingvajn demandojn, kiujn ĝiaj membroj bezonas solvi por siaj eksteraj agadoj sen atendo de formala akademia decido.

Pli da detaloj haveblas: <https://esperanto.brazilo.org/archives/50561>

Arkivo de UEA nun ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko

<https://esfconnected.org/2022/07/15/uea-austrian-national-library/>

Universala Esperanto-Asocio (UEA) lastatempe transdonis "unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado" al la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB). Ni atentigas pri la tiurilataj gazetaraj komunikoj de UEA kaj ANB, kaj pri Fejsbuk-informo de ANB.

<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2022/Transdono-de-la-Arkivo-de-UEA-al-la-Esperantomuzeo-de-la-Auxstria-Nacia-Biblioteko>

<https://www.onb.ac.at/ueber-uns/presse/pressemeldungen/oesterreichische-nationalbibliothek-erhaelt-das-archiv-des-esperanto-weltbundes-universala-esperanto-asocio>

<https://www.facebook.com/nationalbibliothek/photos/a.369711493111586/5237030846379602/>

Madella prelegos ĉe AALA 2022

<https://esfconnected.org/2022/07/19/madella-aala-2022/>

<http://ilei.info/>

<https://2022aalaindia.com/>

La vicprezidantino de ILEI, Alessandra Madella, prelegos pri la ekzamena agado pri Esperanto en Italujo ĉe AALA 2022, la 8-a internacia jarkonferenco de Asian Association for Language Assessment, fine de oktobro en Ĉenajo (Barato).

Koutny prelegis ĉe FIPLV-kongreso

<https://esfconnected.org/2022/07/20/koutny-fipltv/>

La Monda Kongreso de FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj) okazis la 27-an ĝis 29-a de julio en Varsovio. Tie prelegis Ilona Koutny pri la temo "Evoluigi interkulturan kompetentcon per interkultura lingvo".

Sukcese debutis la retaj KER-ekzamenoj

<https://esfconnected.org/2022/07/21/online-exams-good-start/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=873>

Dum la unuaj ses monatoj ĉi-jare Katalin Kováts, estro de la KER-Ekzamena Centro, kun sia teamo okupiĝis pri la restartigo de la ekzamsistemo de UEA, testante la novan nivelon C2,

kreante la teknikajn bazojn de la retaj ekzamenoj kaj organizante la unuajn retajn ekzamenojn. Jen mallonga raporto pri la atingoj.

AILA-Kongreso 2023

<https://esfconnected.org/2022/07/22/aila-congress-2023/>

<https://aila2023.fr/>

<https://aila.info/>

En Lyon (Francio) de la 17-a ĝis la 21-a de julio 2023 okazis la 20-a Mondkongreso de AILA (la Internacia Asocio pri Aplikata Lingvistiko) pri la temo “Diverseco kaj socia kohero en internaciigita mondo: direkte al pli dediĉitaj lingvosciencoj”.

La ĝenerala celo estis konsideri, kiel studoj en aplikata lingvistiko kaj la esploristoj, kiuj tiujn faras, povas partopreni en la konstruo de internaciigita mondo, en kiu respekto por diverseco kiel bazo por socia kohero postulas individuan kaj kolektivan dediĉon.

Kompromiso inter kompleksaj vortoj kaj kompleksa gramatiko

<https://esfconnected.org/2022/07/25/trade-off-words-grammar/>

<https://neurosciencenews.com/ppa-complex-words-20880/>

Laŭ nova studo pri pacientoj kun fruastadia progresiva afazio, homoj, al kiuj estas malfacile diri kompleksajn vortojn, kompensas kunĉenante sinsekvon de pli simplaj vortoj por transdoni la esprimotan ideon.

Rapida fonema lernado en la unuaj vivhoroj

<https://esfconnected.org/2022/07/26/rapid-phonemic-learning/>

<https://www.nature.com/articles/s41562-022-01355-1>

Novnaskitaj homoj povas distingi fonemojn, sed oni ne bone komprenas la nervan mekanismon malantaŭ tiu kapablo. Jena lastatempa artikolo en la anglalingva scienca gazeto *Nature* montras, ke la novnaskita cerbo povas lerni distingi naturajn vokalojn disde retroludigitaj vokaloj, laŭ kontrasto kredeble ne lernita enutere.

Genetika lingvoscienco spuras homan migradon

<https://esfconnected.org/2022/07/27/genetic-linguistics-migration/>

<https://phys.org/news/2022-06-scientists-genetic-methods-linguistics-track.html>

Aplikante metodojn de populacia genetiko – sed uzante lingvaj datumojn anstataŭ genojn – sciencistoj ĉe la Svisa Federacia Instituto pri Teknologio en Laŭzano produktis serion da mapoj montrantaj historiajn migrojn, inkluzive la migron de montaraj kampistoj devenaj de Supra Valezo, kiuj komencis setli en germanlingva Svislando en la 13-a jarcento.

Plurlingva gepatreco

<https://esfconnected.org/2022/07/28/plurilingual-parenting/>

<https://theconversation.com/plurilingual-parenting-why-many-experts-think-families-who-speak-multiple-languages-should-just-go-with-the-flow-185255>

Lingvosciencistoj jam de longe atentis la ideon de dulingva gepatreco, sed nova kompreno de lingva kaj kultura komplikeco estigis alian aliron. Jena mallonga anglalingva artikolo klarigas, kiel la de fakuloj nomata “plurlingvismo” rigardas lingvouzon kiel ion fluecan.

La lingvaĵo de feliĉo

<https://esfconnected.org/2022/08/03/language-of-happiness/>

<https://www.nature.com/articles/s41599-022-01202-8>

Jena artikolo en la revuo *Naturo* ekzamenas la vortostokon uzatan en priskriboj de feliĉo kaj malkaŝas, ke pozitivaj leksikaj unuoj havas limigitan rolon en tiaj raportoj. Ĝi montras ankaŭ, ke kompakta leksikaj familioj precize spegulas semantikan kategoriaron de feliĉfontoj, kaj notas la gravan rolon de komercaj produktaĵoj kiel tiaj fontoj.

“Women” kaj viroj

<https://esfconnected.org/2022/08/05/women-and-men/>

<https://mallonge.net/q1>

Lastatempa artikolo el *New York Times* klarigas la kuriozan historion de la anglaj vortoj *female* (“ina”) kaj *woman* (“virino”), kiuj ne devenas de *male* (“vira”) kaj *man* (almenaŭ ne en ties moderna senco “viro”); evidente oni ne povas samaserti pri la Esperanta vorto *virino*. Ankaŭ *girl* (“knabino”) kaj *lady* (“sinjorino”) estas diskutitaj.

IKIKO 2022

<https://esfconnected.org/2022/08/08/ikiko-2022/>

<https://ikiko.civencia.io/>

La Internacia Kongreso de Interkultura Komunikado (IKIKO) estas monda reta kunveno de lokaj/naciaj kunvenoj, kiu okazos de la 8-a ĝis la 12-a de novembro de 2022. Temas pri interkultura komunikado, kun la celo kolekti ideojn kaj montri Esperanton funkcia al ne-esperantistoj.

Se en via urbo aŭ lando vi povos kunmeti teameton da esperantistoj, IKIKO petas vin aranĝi tion por viaj samurbanoj, samlandanoj, prefere ne-Esperantistoj, kiuj interesiĝas diskuti pri lingva justeco, hegemonioj, edukado en plurkultura etoso, internaciaj renkontiĝoj, ktp. Eblas kontribui al la diskuto per rekta alparolo, per skribita teksto ankaŭ scienca, per filmeto, per kanto, ktp. Ĉiuj materialoj aperos en revuo aŭ en reta paĝaro.

Esperanto, The Aggressor Language

<https://esfconnected.org/2022/08/10/esperanto-aggressor-language/>

<https://www.amazon.com/dp/0996482032>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto._The_Aggressor_Language

La libro *Readings in Language Studies, Volume 7: Intersections of Peace and Language*, eldonita en 2019, havas finan ĉapitron de Timothy Reagan pri “Esperanto, The Aggressor Language”, manlibro de la usona armeo en la fruaj 1960-aj jaroj.

Bildstrio pri Zamenhof

<https://esfconnected.org/2022/08/12/zamenhof-comic-strip/>

<https://photos.app.goo.gl/hKen7P9LT8dUcdLFA>

Jean-Pierre Cavelan komencis bildstrion en la franca kaj en Esperanto pri la vivo de Ludoviko-Lazaro Zamenhof. Ĉiu, kiu parolas Esperanton, estas invitita helpi la laboron per kritikoj, korektoj, sugestoj, (mal)kuraĝigoj ktp.

Mallonga historio de Esperanto

<https://esfconnected.org/2022/08/17/brief-history/>

<https://theconversation.com/a-brief-history-of-esperanto-the-135-year-old-language-of-peace-hated-by-hitler-and-stalin-alike-186025>

Jen utila anglalingva artikolo de Joshua Holzer, Asista Profesoro pri Politika Scienco ĉe Westminster-Kolegio (Misurio, Usono), sub la titolo “Mallonga historio de Esperanto, la 135-jara lingvo de paco egale malamita de Hitlero kaj Stalino”.

Monda Humanitara Tago

<https://esfconnected.org/2022/08/19/world-humanitarian-day/>

<https://translatorswithoutborders.org/>

<https://translatorswithoutborders.org/blog/humanitarian-voices/>

La 19-a de aŭgusto estis la Monda Humanitara Tago, kaj la ne-profitocela organizaĵo Tradukistoj Sen Landlimoj honoris humanitaristojn ĉie per diskonigo de la voĉoj de sia komunumo.

Esperanto en la revolucia Rusio

<https://esfconnected.org/2022/08/22/esperanto-in-revolutionary-russia/>

<https://www.tandfonline.com/doi/abs/10.1080/15387216.2022.2103724>

Lastatempe aperis recenzo verkita de Alison Long pri la libro de Brigid O’Keeffe *Esperanto and languages of internationalism in revolutionary Russia* (“Esperanto kaj lingvoj de internaciismo en la revolucia Rusio”).

Konferenco Estonteco de Lingvoj

<https://esfconnected.org/2022/08/23/future-of-languages/>

<https://vigdis.hi.is/en/events/fiplv-nbr-conference/>

La internacia konferenco Estonteco de Lingvoj okazos ĉe la Universitato de Islando en Rejkjaviko la 8-an kaj 9-an de junio 2023. La programo konsistos el teoriaj kaj praktikaj prezentoj, dum lingvo-instruistoj kunvenas por reciproke lerni el siaj spertoj kaj agadoj, samtempe informigante pri estontaj perspektivoj kaj defioj. Prezentoj okazos en diversaj lingvoj, sed la angla estos la ĉefa lingvo de la konferenco.

Ĉu esti aŭ ne esti?

<https://esfconnected.org/2022/08/24/to-be-or-not-to-be/>

<https://www.atlantis-press.com/article/125976131.pdf>

Mallonga artikolo de Yutian Li, studento ĉe la Pekina Reĝa Lernejo, sub la titolo “The Vitality of Esperanto: To be or Not to be?” (“La vivemo de Esperanto: ĉu esti aŭ ne esti?”), donas ĝeneralan superrigardon pri Esperanto kaj eble interesos.

Universala lingvoreto en la cerbo

<https://esfconnected.org/2022/08/26/universal-language-network/>

<http://www.sci-news.com/othersciences/linguistics/universal-language-network-11015.html>

En ampleksa studo per funkcia magneta resonanca bildigo, nervosciencistoj de MIT kaj la Universitato Harvard taksis la aserton pri lingva universaleco rilate al ĉefaj trajtoj de la nerva arĥitekturo de la cerbo.

Edukado.net en Montrealo

<https://esfconnected.org/2022/08/31/edukado-net-montreal/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=875>

En aŭgusto Edukado.net aktive kontribuis al la programoj de la montreala UK. Jen raporto pri la agado, kun fotoj.

Latino, lingvoscienco, amikeco kaj poezio

<https://esfconnected.org/2022/09/02/latin-linguistics-friendship-poetry/>

<https://www.counterpunch.org/2022/08/19/latin-and-linguistics-as-the-gateway-to-friendship-and-poetry-about-palestine/>

Jen anglalingva intervjuo, sub la titolo “Latino kaj lingvoscienco kiel pordo al amikeco kaj poezio pri Palestino”, kun Kevin Hadduck, aŭtoro de “Beloved Brother, Beloved Sister. Poems for Palestine” (“Amata frato, amata fratino. Poemoj por Palestino”, 2019).

“Bele ilustrita, ĉi tiu libro estas forte rekomendata al tiuj, kiuj deziras spuri la evoluon de daŭrajn amikecojn trans grandaj distancoj, amikecojn eternigitajn en versoj. La amikeco de Kevin Hadduck kun Duaa, Ghada, Haneen, Hassan, Hubba, Rana kaj Ahmad, se nomi nur kelkajn, estas tia, kian bezonas ĉi tiu mondo.”

Neparolaj voĉsignaloj

<https://esfconnected.org/2022/09/05/non-speech-vocal-cues/>

<https://www.sciencedaily.com/releases/2022/07/220728142928.htm>

Nova studo trovis, ke specifaj partoj de la cerbo rekonas kompleksajn signalojn en homaj voĉaj sonoj, kiuj ne koncernas parolon, ekzemple en ploroj, tusoj aŭ anheloj. Komprenoj pri la organizo de la cerba voĉrekona sistemo ebligas, ke esploristoj pli bone komprenu nervajn perturbojn, ĉe kiuj voĉperceptado modifiĝis aŭ mankas, kaj eĉ helpas krei pli bonajn voĉregatajn helpaparatojn.

Lingvoscienco kaj la aŭstronezia ekspansio

<https://esfconnected.org/2022/09/07/austronesian-expansion/>

<https://theconversation.com/linguistics-locates-the-beginnings-of-the-austronesian-expansion-with-indigenous-seafaring-people-in-eastern-taiwan-186547>

La studo de indiĝenaj lingvoj hodiaŭ parolataj en la maraj partoj de sudorienta Azio ĵetis novan lumon sur la komencojn de la aŭstronezia ekspansio. Tio estis la lasta granda migro de homoj, kiuj disvastiĝis trans Pacifikon de orienta Tajvano kaj fine setlis en Aotearoo (Novzelando).

La lingvo, kiu ne uzas “ne”

<https://esfconnected.org/2022/09/09/language-doesnt-use-no/>

<https://www.bbc.com/future/article/20220804-kusunda-the-language-isolate-with-no-word-for-no>

La kusunda lingvo en Nepalo havas nekonatan devenon kaj kelke da kuriozaĵoj, ekzemple mankon de vortoj por “jes” aŭ “ne”. Al ĝi restas ankaŭ nur unu flua parolanto, situacion, kiun lingvistoj rapidas ŝanĝi.

Lingvaj prognozaj dum komprenado

<https://esfconnected.org/2022/09/14/linguistic-predictions/>

<https://www.pnas.org/doi/10.1073/pnas.2201968119>

Teoriistoj proponas, ke la cerbo konstante faras implicitajn prognozojn, kiuj gvidas traktadon de informoj. Dum lingvokomprenado, oni ja observis tiajn prognozojn, sed oni ankoraŭ ne interkonsentis pri tio, en kiuj kondiĉoj kaj en kiu nivelo de traktado tiuj prognozaj okazas. Nova studo montras, ke la cerbo spontane prognozas venontan lingvaĵon en multaj niveloj de abstraktado.

De idealismo al realismo

<https://esfconnected.org/2022/09/16/from-ideal-to-real/>

<https://eo.globalvoices.org/about/>

<https://eo.globalvoices.org/2022/08/13307/>

La neprofitocela organizaĵo Global Voices (Tutmondaj Voĉoj) lastatempe aperigis artikolon en Esperanto kaj sep aliaj lingvoj, sub la titolo “Esperanto: De idealismo al realismo”.

Kantado, parolproduktado kaj la cerbo

<https://esfconnected.org/2022/09/20/singing-speech-production/>

<https://penntoday.upenn.edu/news/Penn-undergrads-study-singing-speech-production-brain-Linguistics-lab>

Jen interesa artikolo pri lastatempa laboro gvidata de Jianjing Kuang, lingvisto ĉe la Universitato de Pensilvanio, por studi, kiel homoj kreas vokalojn, kiam ili kantas.

La estonteco de lingvoscienco

<https://esfconnected.org/2022/09/22/future-of-linguistics/>

<https://medium.datadriveninvestor.com/the-future-of-linguistics-4299769d1faa>

Ĉi tiu blogartikolo diskutas aktualajn direktojn en lingvoscienco kaj ilia maniero modli nian estontecon.

Reta KER-ekzameno je nivelo C2 novembre

<https://esfconnected.org/2022/09/28/online-c2-exam/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=877>

En 2022 ekzameno je la plej alta nivelo (C2) laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) estis lanĉita de la KER-Ekzamena Centro (KER-EC) de UEA. Teamo de fakuloj laboris pri tio dum pli ol unu jaro. Spertaj esperantistoj kaj lingvistoj testis la unuan provserion kaj oni ellaboris somere la unuan veran teston, uzitan en ĉeesta papera ekzameno dum la UK en Montrealo.

Responde al la intereso de la esperantistaro KER-EC pretigos novan testserion, laŭ kiu eblos ekzameniĝi *rete*, la 26-an kaj 27-an de novembro.

Rudolf Carnap kaj la Esperanto-movado

<https://esfconnected.org/2022/09/30/rudolf-carnap-esperanto-movement/>

<https://www.liberafolio.org/2022/05/10/carnap-filozofa-forgesita-de-esperantistoj/>

<https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-030-84887-3>

La ĉi-jara germanlingva libro *Logischer Empirismus, Lebensreform und die deutsche Jugendbewegung* (Logika empiriismo, vivreformo kaj la germana junulara movado) enhavas ĉapitron de Ulrich Lins, “Sprache transnational: Rudolf Carnap und die Esperantobewegung” (Transnacia lingvo: Rudolf Carnap kaj la Esperanto-movado”).

Libera Folio intervjuis Lins pri la temo en majo. La libro estas senpage elŝutebla ĉe la eldonejo.

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. La enhavo de ambaŭ kutime aperas pli frue en la blogo [ESF Connected](#). Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org aŭ contact@esfconnect.org. Limdato por la venonta numero: 31-a de decembro 2022. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj.

ESF en la reto: www.esperantic.org, esfacademic.org, esfconnected.org, interlingvistiko.net, www.facebook.com/esperantic. Tvitero: [@esperanticsf](#), [@esfacademic](#).

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians (esperantologio, interlingvistiko), Michele Gazzola (lingvopolitiko), Angela Tellier (universitataj studprogramoj), Orlando Raola (bibliotekoj). <https://uea.org/asocio/CED>